



TASKO PLENUMITA

Kiam ni alvenas al la lasta monato de nia oficperiodo estas la momento por retrorigardi kaj analizi nian agadon dum tiuj lastaj kvar jaroj. Kaj post tion fari, ni povas fiere aserti: nia tasko estis plenumita!

Se ni relegas la laborplanon, ni konstatas ke ĉio kion ni tiam promesis, ĉu en la kampo de la informado, ĉu en la kampo de instruado, ĉu en la kampo de ĝeneralaj aferoj, estis farita.

En la kampo de informado, ni disponigis al la brazila esperantistaro, dum tiuj kvar jaroj, la bazan materialon por la propagando de la Internacia Lingvo, t.e., prospektoj kaj afiŝoj. Brazila Esperantisto reaperis (12 numeroj). Regule eldoniĝis portugallingva informilo pri Esperanto (Esperanto Noticias: 36 numeroj), dissendita al centoj da adresoj en la tuta Brazilo, kaj Esperant lingva bulteno kun informoj pri BEL kaj pri la Brazila Movado (BEL informas: 30 numeroj). Kaj, dum unu jaro, ni funkciigis semajnan radiprogramon.

En la kampo de instruado, daŭre funkciis kursoj ĉu enklasaj (baza, perfektiga kaj supera), ĉu korespondaj (baza, perfektiga, supera kaj porinstruista). Krome ankaŭ, dum tiu periodo, ne mankis al la brazila esperantistaro vortaro (Vocabulário "Carlos Domingues") kaj lerniloj (tiuj lastaj danke al la senlaca laboro de Sylla Chaves).

Fine, en la kampo de la ĝeneralaj aferoj, ni, interalie, elstarigas la okazigon de ĉiusemajnaj kulturkunvenoj en la sidejo de BEL konsistantaj el prelegoj diverstemaj (Komputado, Medicino, Astrologio, Historio ktp ...) kaj el variaj kunsidoj (poezio, vortludoj, skeĉoj, ktp ...).

Aparte, menciindas la reveno de la serio de Brazilaj Kongresoj de Esperanto, nun komune aŭspiciitaj de BEL, BKE kaj KKE.

Tamen, ni devas konfesi ke nia plej granda kontento estas konstati la kresko de nia membraro, kiu de 425, en 1982, pasis al 700, en 1985.

Evidente, ke ni ne sukcesis kontentigi ĉiujn. Sed, ni estas certaj,ke almenaŭ niaj lojalaj kontraŭloj rekonos,ke ni okazigis la plej demokratian balotadon en la historio de BEL, kies krono estis la elekto de porkunfandiĝa kaj porfederacia kandidataro.

Al ĉiuj, kiuj iamaniere helpis nin dum nia oficperiodo nian koran dankon kaj al la nova estraro de BEL, ni, sincere, deziras fruktodonan laboron!

Aloisio Sartorato

AL ĈIUJ PERSONOJ, KIUJ SENDIS AL NI SALUTESPRIMOJN OKAZE DE LA JARFINAJ FESTOJ, KAJ ANKAŬ AL ĈĴUJ MEMBROJ DE BEL, NI, VARME, DEZIRAS PROSPERAN NOVJARON!

NOVA ESTRARO EN BEL

La 7-an de Decembro, okaze de la Eksterordinara Ĝenerala Kunsido, estis elektitaj la novaj estraranoj de BEL por la oficperiodo 1986-1989:

Estraro

Prezidanto: NELSON PEREIRA DE SOUZA Vic-Prezidanto: WALTER AUGUSTO FRANCINI Ĉenerala-Sekretario: JORGE SOARES DAS NEVES Unua Sekretario: GIVANILDO RAMOS COSTA

Dua Sekretario: WANDA SOUZA LOPES Kasisto: WALTER FERNANDES MURICY

Kontrola Komitato

CHERSONESO GALVÃO, ROMUALDO DE CASTRO CELANI KAJ ALVARO FAUSTO DE SOUZA.


Konsultiĝa Komitato

AMARO PINANGÉ SOARES (PE), ESPEDITA DE CASTRO FEITOSA (PR), EVALDO PAULI (SC), GILSON VILLAS BOAS PASSOS (MA), IVON BARBOSA (SP), JOSÉ MÁRIO MARQUES (RN), MARCUS TÚLIO DE ALMEIDA FLORES (MG), MODESTO BELMONTE DE ABREU (RS), PAULO AMORIM CARDOSO (CE), RAUL CONDE (GO), ROBERTO VIEIRA RESENDE (DF) KAJ IVETTE MENEZES QUEIROZ (BA).

La oficiala enposteniĝo okazos la 2-an de Januaro 86.



S-ano Jorge das Neves gvidas la Balotadon



S-ano Péter Pál Denke prelegas pri Hungario

ESPERANTO-KLUBO DE CAMPOS REKONITA KIEL SOCIETO DE PUBLIKA UTILECO

Laŭ la ŝtata leĝo nº 911, de 1.11.85, Esperanto-Klubo de Campos estis rekonita kiel societo de publika utileco. Jen la kompleta portugallingva teksto de tiu Leĝo:

LEI Nº 911, de 1º de novembro de 1985

CONSIDERA DE UTILIDADE PÚBLICA O CLUBE DE ESPERANTO DE CAMPOS.

O GOVERNADOR DO ESTADO DO RIO DE JANEIRO

Faço saber que a Assembleia Legislativa do Estado do Rio de Janeiro decreta e eu sanciono a seguinte lei:

Art? 1? - E' considerado de utilidade pública o CLUBE DE ESPERANTO DE CAMPOS, com sede provisória na rua Tenente Coronel Cardoso, 821 - Campos e foro no Município de Campos - Estado do Rio de Janeiro.

Art? 2? - Esta lei entrarā em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrário.

Rio de Janeiro, 01 de novembro de 1985

LEONEL BRIZOLA VIVALDO VIEIRA BARBOSA

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

Informado

ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ DE BAHIA - Laŭ informo al ni sendita de S-ano Isao Noguti, okazas, ĉiutage, pere de "Radio FM Bandeirantes", dissendado de informoj pri la internacia lingvo; ankaŭ la 25-an de oktobro, je la 19h15m, TV-Bandeirantes elsendis 7-minutan intervjuon kun S-ano José Siquara da Rocha, Vic-Prezidanto de Bahia Esperanto-Asocio, kiu informis al la spektantaro pri la lingvo kaj pri la movado en Bahia kaj Brazilo.

NOVAĴO PRI ESPERANTO EN "O DESPERTADOR" - La monata spiritisma ĵurnalo "O Despertador", eldonata en Sao Paulo, publikigis novaĵon pri Esperanto, en sia eldono ĵulio/aŭgusto 85.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN IRECÊ (BA) - La 16-an de aŭgusto okazis en Irecê (BA), ĉe "Centro Espirita Jesus de Nazare", prelego pri Esperanto, farita de S-ano Isao Noguti.

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "O MARAUENSE" - La oktobra eldono de "O Marauense", ĵurnalo monata eldonata en Marau (BA), publikigis artikolon de S-ano Eléus Leonardo de Sá pri la disvastigado de la Internacia Lingvo en la Regiono.

PRELEGO PRI "ESPERANTO KAJ INFORMADIKO" EN CAMPINAS - okazis la 30-an de novembro 85, en la cefsalono de la Municipa Prefektejo de Campinas, sub la aŭspicio de Kultura Centro de Esperanto. Prelegis S-ano David Bianchini. "Diário do Povo", gazeto el Campinas, raportis pri la kunveno.

ESPERANTO KADRE DE LA SEMAJNO DE LA JUNULARO EN BELO HORIZONTE (MG) — Jen informo aperinta en la bulteno "Hileo", aŭgusto/septembro 85: "Finigos en ci tiu dimanco, la 6-an de oktobro, la SEMAJNO DE LA JUNULARO, per granda spektaklo de Marku Ribas kaj la komponisto Flávio Fonseca (el Brasilia), kiuj prezentos muzikojn en la Internacia Lingvo Esperanto. La Semajno de la Junularo komenciĝis la pasintan dimancon, la 29-an de septembro; estas iniciato de la kristana Asocio de la Junuloj kaj Municipa Sekretariejo de Kulturo kaj Turismo de Belo Horizonte. Ĉiuj aktivecoj okazas en la Parko Mangabeiras, kun la ĉeesto de cent mil gejunuloj, lemantoj el la unua, dua kaj tria grado. Esperanto-Asocio de Belo Horizonte aktive partoprenas en la Semajno. En ĝia stando troveblas librejo kaj ekspozicio de diversaj alilandaj libroj, aŭdvidaj tekstoj pri Esperanto, kaj krome, oni disdonas, informajn faldfoliojn pri la kultura valoro de Esperanto. La muzika prezentado riciĝis per la partopreno de pluraj kantistoj kiel Beto Guedes kaj aliaj famaj nomoj. Flávio Fonseca fermos la Semajnon de la Junularo, prezentante muzikojn de lia disko lancota venontmonaton, kiu enhavas kanzonon de Tom Jobim kaj Vinicios de Moræs, la sola tradukita kanzono en la disko, kies muzikaĵoj estas originale komponitaj en Esperanto. Pliaj informoj pri la disko kaj aĉeto ĉe Esperanto Asocio de Brasilia, Caixa Postal 11.1124 — CEP 70084-Brasilia, DF".

Instruado

IAUDINDA LABORO POR ESPERANTO, EN JOÃO PESSOA (PB) — Jen ĝojigaj informoj al ni senditaj de S-ano Jason Gonçalves de Lima, en letero de la 31-a de Oktobro: "Ĉi-tie, en João Pessoa, krom la E-Kurso ĉe la Federacia Universitato funkcias nuntempe speciala E-Kurso en ŝtata lemejo, en kvartalo "Tambiá", nur por lingvo-instruistoj. Tiu lasta kurso, kun ok lernantoj, estas gvidata de S-ano Ramatis. Post la unua de marto 86, funkcios ankaŭ E-Kurso ĉe "Centro Estadual de Linguas", oficiala lingvo-lemejo, kie oni jam instruas la francan, la anglan kaj la germanan. La instruisto nakaŭ estos S-ano Ramatis, kiu estos translokigita de la Sekretariejo pri Edukado el sia nuna fako pri fiziko al tiu pri Esperanto".

KURSO DE ESPERANTO ĈE KATOLIKA UNIVERSITATO DE PARANÁ - Jen informo publikigita en "Paraná Informilo", aŭgusto/sep 85: "Ĝis la fino de la jaro, ĉiun jaŭdon, dek studentoj de la Katolika Universitato de Paraná, sub la gvido de Prof. Ceraldo Mattos, kunvenos por lemi Esperanton, pere de la metodo "Cerda Malaperis".

TRIDEK NOVAJ ESPERANTISTOJ EN BELO HORIZONTE - Antaŭ nelonge, finiĝis Intensiva Baza Kurso de Esperanto, aŭspiciita de "União Espírita Mineira", sub la gvidado de S-anoj Alberto L.M.Chueiri kaj Julio Cesar M. da Silva. Tridek lernantoj sukcesis la aprobiĝon en la fina ekzameno kaj ricevis diplomojn aljuĝitajn de BEL.

Diversaj

REAPERIS "KONTAKTILO" -"En la jaro de la kvardekjariĝo de Esperanto Societo de Porto Alegre ekaperas ĝia monata bulteno". Tiel komenciĝas la enkonduka artikolo de Kontaktilo, julio/85, kiu alportas interesajn artikolojn kiel "Antarktiko", "Kluboj" kaj "Esperanto kaj la Tria Mondo". La aŭgusta numero jam dissendita enhavas artikolon pri la 21a. BKE.

FONDITA KULTURA CENTRO DE ESPERANTO, EN CAMPINAS, SP - La 26-an de Oktobro, okazis, en Campinas, la fonda kunveno de Kultura Centro de Esperanto (Av. Campos Sales 890, apto 104, 13.100-CAMPINAS, SP). La Centro celas fortigi la lokan movadon kaj ĉirkaŭaĵon.

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

Diversaj

FONDITA ESPERANTO-SOCIETO DE SANTA MARIA (RS) - "Danke al klopodoj de D-ro Vitor Francisco Sehuch, verkisto kaj elstara universitata profesoro en la urbo Santa Maria, RS, estis fondita, la 20-an de septembro, Esperanto-Societo de Santa Maria". Tiel informas nin S-ano Ivo Sanguinetti, aldonante ke la plejmulto el la estraranoj kaj konsilantoj de tiu nova grupo konsistas el universitataj profesoroj".

KURSO PRI KOMPARA LINGVISTIKO ESPERANTO-PORTUGALA - Jam komencas fariĝi tradiciaj la altnivelaj kursoj de Esperanto-Asocio de Brasilia. Ĉi-foje, temas pri "Kompara Lingvistiko Esperanto-Portugala", sub la gvidado de nia kompetenta S-ano Roberto Passos Nogueira. La kurso kies tempodaŭro estos 15-hora, okazos en la sidejo de EAB (SRIN Ed. Brasilia Rádio Center, ĉambro 2142), de la 13-17.01.86. Ankaŭ ĵus aperis la detala raporto pri la kurso okazinta en julio("La arta tradukado"), sub la gvido de S-ano Leopoldo Knoedt. Entute 20 kursanoj, el Federacia Distrikto (9) kaj 6 brazilaj ŝtatoj (11).

ESPERANTO CITITA EN ROMANO DE ISABEL ALLENDE - Laŭ informo de nia S-anino Izabel Santiago, aperas citaĵo pri Esperanto en la portugallingva eldono de la verko de la peruana aŭtorino Isabel Allende "A Casa dos Espíritos" (La Hejmo de la Spiritoj), Eld. Difel, 1982, p.469: "Os movimentos do pendulo assinalavam as letras e formavam as mensagens em espanhol e esperanto, demonstrando assim que são os únicos idiomas que interessam aos seres de outras dimensões ... devia ser obrigatório as crianças estudarem esperanto!"

ELSTARA ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "O REFORMADOR" - La oficiala organo de Brazila Spiritisma Federacio, "O Reformador", en sia oktobra eldono, regalis nin per tre interesa artikolo titolita "Esperanto: Lição de Fraternidade", el la plumo de nia kompetenta S-ano Affonso Soares.

RENOVIGITA LA KONTRAKTO INTER "BAHIA ESPERANTO-ASOCIO" KAJ SEKRETARIO PRI EDUKADO KAJ KULTURO DE BAHIA - La 26-an de aŭgusto 85, Bahia E-Asocio kaj Sekretariejo pri Edukado kaj Kulturo de Bahia renovigis la kontrakton per kiu tiu lasta permesas la pluan uzadon, dum kvin jaroj, de la konstrua-jo, kie troviĝas la sidejo de Bahia E-Asocio.

KUNIGILO ESPERANTO-KLUBO ATENDAS VIAN DONACON! - Kunigilo E-Klubo (Caixa Postal 277, CAMPINA GRANDE, Paraiba) estas organizanta sian bibliotekon. Tial ili turnas sin al ĉiuj bonvolemuloj kiuj povas donaci por ilia Biblioteko libron, revuojn, prospektojn ktp ...

FONDITA "PRESIDENTE FIGUEIREDO ESPERANTO-ASOCIO" - Laŭ informo sendita al ni de S-ano Raimundo Dourado de Souza, la pasintan oktobron fondiĝis E-Asocio en la urbo Presidente Figueiredo en ŝtato Amazonas. Ĝia unua Prezidanto estas S-ano Severino Felisberto de Santana kaj la adreso de la Asocio estas: Secretaria Municipal de Presidente Fiqueiredo, CEP-69.375, Amazonas.

SOCIETO LORENZ FESTOS ZAMENHOF - Societo Lorenz, U.S.E.E.R.J. kaj Instituto Cultural Espírita do Brasil okazigos la 14-an de Decembro omaĝon al Zamenhof, kies oficiala oratoro estos S-ano Celso Martins, kaj lanĉon de Almanako Lorenz 86.

NOVA ESTRARO ĈE ESPERANTO SONSERPENTA ASOCIO - Laŭ "Parana Informilo" aŭgusto/sep 85, ESA havas novan estraron ekde la 30-a de Junio, sub la prezidanteco de S-ano Vilmar Ransolin.

FONDIĜIS "POÇOS DE CALDAS ESPERANTO-ASOCIO" - La 15-an de Decembro, en la Municipa Teatro, oka zos la solena fondkunveno de "Poços de Caldas E-Asocio", kies unua Prezidanto fariĝos S-ano Aparecido Ramos Barbosa.

NITEROI FESTAS ZAMENHOF - La 7-an de Decembro, okazos Zamenhofa FestKunveno de Niteroi E-Klubo, ce "Conservatório De Música de Niterói" (Rua São Pedro, 96). Oni ankaŭ aljuĝos diplomojn al la kurs finintoj de Baza Kurso. Festparolados D-ro Geraldo Freitas Caldas, prokuroro el Niterói. (Laŭ informoj de S-ano Joaquim do Couto).

APERIS "VERDA TAPIŜO Nº 3" - Kun ĝojo, ni registras la aperon de "Verda Tapiŝo" nº 3, bulteno de Internacia E-Klubo pri Futbalo. Ĝi estas eldonata en Porto Alegre, danke al la senlaca klopodo de S-ano Flávio A.O. Gomes. Ĉies apogo de "la lando de 1' futbalo" al "Verda Tapiŝo"!

"1º CONGRESSO MINEIRO DE ESPERANTO" - Aŭspiciata de Belorizonta E-Asocio kaj organizata de "Cír culo Esperantista de Divinopolis" okazos en Divinopolis (MG), de la 27-a ĝis la 30-a de marto 86, la Unua Minana E-Kongreso.

REVUO PRI EDUKADO KUN RESUMOJ EN ESPERANTO - Ĵus aperis la unua numero de JORNADA "Eduka Spiritisma Revuo" (Caixa Postal 76.242, CEP-25.001-DUQUE DE CAXIAS, RJ), eldonata sub la respondeco de "Instituto de Desenvolvimento Educacional e Social", en la urbo Duque de Caxias, RJ. Interesa afero estas ke post ĉiuj artikoloj aperas resumoj en Esperanto.